


BONA ESPERO



Rundbrief für Freunde, Förderer und Mitglieder
des Fördervereins "Bona Espero" e.V.

Cirkulero por amikoj, subtenantoj kaj membroj
de la "Subtenanta Asocio de BE" e.V.

n-ro 21

Decembro 1987

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465

Por ĉiu briko unu masonisto!

Tio estas la sekreta recepto de la rapidkonstruo en BONA ESPERO. Sur tiu foto el oktobro pozas la ridantaj infanoj antaŭ la ankoraŭ sentegmenta nova domo. Intertempe ĝi estas kovrita, ĝi havas fenestrojn kaj la internaj laboroj estas farataj.

"La brikojn ni ne mem fabrikis," skribis Ursula Grattapaglia en novembro. "En Alto Paraiso estas protestanta pastro kiu siaj fideluloj. Ili fabrikis kaj vendis al ni malmultekoste. Por 3.000 cemento-brikoj ni pagis malpli ol 700,-gm. El tiu sumo pli ol la duono servis por aĉeti cementon. La konstruaĵo estas vere giganta, se vi konsideras, ke la baza muro estas 23 metrojn longa. La laboroj progresas rapidritme kaj ni mem miras, kiel bone ĉio glitas. La grandaj herooj estas Frank kaj Georg, kiuj intertempe jam alportis pli ol 100 aŭtoplanojn da gruzo, sablo, brikoj, ŝtonoj ktp. Antaŭe nur Giuseppe kaj mi kapablis stiri aŭtomobilon kaj nur li riparas. Nun du aldone stiras kaj eĉ riparas, se necese. Granda donaco por ni.

Nun estas printempo kaj ni multon plantadas. Nia filo Dario alportis specialajn arbojn, produktitajn en laboratorio de Sao Paulo, kie li laboras. Pli ol 100 arbojn ni transplantis: pomoj, eŭkalipto, morusoj, bananoj, oranĝoj, mandarenoj, ktp. Ili estas aparte rezistaj al malutilaj insektoj kaj ni evitas uzi venenon

Ni ankaŭ semis maizon, heliantojn, kukumojn, kukurbojn kaj fazeolojn grandkvante. Nia legomejo estas plena de multspecaj legomoj: tomatoj, karotoj, brasikoj, kapsikoj, rafanoj, rafanetoj kaj ruĝaj betoj."

Kaj ni en mezeŭropo GUAS la tipan veteron de tiu sezono. Estas malvarme, aero malseketa kaj en niaj ĝardenoj nur ankoraŭ krispa brasiko sur cetere malplenaj bedoj. Sed ni ne tro envidu la bonesperanojn. KIE ESTAS MIELO - TIE NE MANKAS MUSOJ! Simietoj kaj papagoj sin invitas volonte kaj grandfamilie por kunmanĝi en tiu paradiza ĝardeno.

"Ĉi tiu jaro estas signifa, ne nur pro la 100-jara jubileo de Esperanto sed por BE ĉi ja ankaŭ signifas ekziston 30-jaran. Ĝus ni en BONA ESPERO okazigis la estrarkunvenon kaj la elekton de la nova estraro por la venontaj tri jaroj. Restas nia Ĝenerala Direktoro Eivaldo Alves Silva, Ines kaj Neusa, du el la fondintinoj restas, Giuseppe kaj ni.

Vi vidas, ke ankaŭ ĉi tie la stabileco regas."

Per tiu ankaŭ Ursula Grattapaglia celas la jarĉefkunvenon de la societo BONA ESPERO e.V., kie la ĉeestantaj membroj reelektis Margret Brandenburg, prezidantino, Henriette Otto, vicprezidantino, Ursula Schrapp, kasistino, Adelheid Holtmann, protokolistino dum 6 jaroj, rezignis pri sia ofico. Ŝi multe helpis al ni dum la fonda periodo de la societo. Anstataŭas ŝin Erna Schweins el Telgte kaj la kason kontrolas Willi Brandenburg kaj Hedwig Fischer. La estraro aŭdis multajn kuraĝigajn vortojn de la ĉeestantoj, pli ol 50, ĉar la programo estis parto de la VESTFALIA AŬTUNO en Telgte. Hannelore kaj Bernhard La Roche el Kaiserslautern montris diapozitivojn pri nunjara BE kaj la teknika progreso, Elfriede Kruse kompletigis la informojn per konvena elekto el ŝia dufoja restado tie. Kio estus kunveno de amikoj de BONA ESPERO sen diskuto pri novaj planoj!!

"Ni pretus eventuale aldoni al la nova domo unu alon por alkonstrui grandan halon por teknika alfabetigado!

Temus pri rapidkursoj, feriokursoj, kie ni povus al niaj nunaj lernantoj, al iliaj gepatroj, grandaj fratoj kaj poste eventuale al deko da talentaj gejunuloj el la vilaĝo instrui bazajn sciojn pri laboriloj, funkcio kaj zorgado, konstruo de akvokondukiloj, hidraŭlikaj scioj, konstruo de simpla necesejo, kiel trakti gasbotelon, ripari biciklon, kudromaŝinon, akvokranon, seruron, konstrui plej simplajn meblojn, ŝtalojn, domojn, ekonomia mastrumado, kuiri, baki ktp. Etskale ni tion jam faras de jaroj, sed se ni havus halon kun iloj kaj etaj maŝinoj, efikus multe pli kaj la infanoj havus pli bonajn kondiĉojn por vivi poste." Kaj Ursula finas: "Jam nun niaj knaboj daŭre rigardas interesite kiam Frank kaj Georg riparas motoron, pordon, tirkeston, tablon, seruron aŭ liton kaj helpas teni la martelon kaj la ŝraŭbojn. Vi vidas, ni jam komencis!"

Kaj ni nun finas! Finiĝas la jubilea jaro de Esperanto kaj la tridekjariĝo de BONA ESPERO. Ni ĉi tie komencas la 7an jaron de nia solidareco, efiká kaj ĝojiga por ni ĉiuj. Dankon al vi kie ajn kaj kiamaniere vi klopodas forigi iom de la nejusteco en tiu mondo.

Sanon kaj forton en 1988

=====

Pro Stein ein Maurer! Das ist das heimliche Schnellbaurezept in BE.

Auf dem Foto vom Oktober posieren die lachenden Kinder vor dem noch dachlosen, neuen Haus. Inzwischen ist es gedeckt, es hat Fenster und Türen und man ist bei den Innenarbeiten.

"Die Steine haben wir nicht selber gemacht," schreibt Ursula Grattapaglia in ihrem letzten Brief. "In Alto Paraiso fabriziert ein evangelischer Pastor mit seinen Getreuen Steine und er hat sie uns billig verkauft. 3000 Zementsteine für weniger als 700,-DM und von dieser Summe war die Hälfte für den Zement. Das Gebäude ist wirklich gigantisch wenn man bedenkt, daß die Grundmauer 23 Meter lang ist. Die Arbeiten schreiten zügig voran und ich wundere mich, wie glatt alles geht. Die großen Helden sind Frank und Georg, die inzwischen schon mehr als 100 Autofuhren mit Kies, Sand, Ziegel und Steine gefahren haben. Vorher konnten nur Giuseppe und ich autofahren und nur er reparierte. Nun fahren zwei mehr und reparieren auch das Auto, wenn es notwendig ist. Das ist ein großes Geschenk für uns.


Nun ist Frühling und Pflanzzeit. Unser Sohn Dario, der in einer Versuchsanlage in São Paulo arbeitet, hat uns von dort besondere Sträucher mitgebracht Sie sind widerstandsfähig gegen Schadinsekten und wir brauchen kein Gift zu spritzen. Mehr als 100 Bäume sind gepflanzt worden, u.a. Äpfel, Eukalyptus, Bananen, Orangen und Mandarinen. Wir haben auch viel Mais, Sonnenblumen, Gurken, Kürbisse und Bohnen gesät. Unser Garten ist voll von verschiedenerelei Gemüse: Tomaten, Karotten, Kohl, Paprika, Radieschen, Rettig, Rote Bete,

Wir hier in Mitteleuropa GENIESSEN das typische Wetter dieser Jahreszeit. Es ist kalt, feucht und in unseren Gemüsegärten steht nur noch etwas Grünkohl auf den sonst abgeräumten Beeten. Aber wir sollten die Bonesperaner nicht zu sehr beneiden. WO HONIG IST - SIND FLIEGEN NICHT WEIT Äffchen und Papageien laden sich gerne und mit Großfamilien ein, um mitzuessen.

"Dieses Jahr ist nicht nur bedeutungsvoll, weil Esperanto 100 Jahre alt geworden ist, auch BE besteht 30 Jahre. Wir hatten gerade Vorstandssitzung mit Wahlen für die nächsten 3 Jahre. Vorsitzender bleibt Enivaldo Alves Silva, Ines und Neusa als Gründungsmitglieder bleiben im Vorstand, ebenso Giuseppe und ich. Ihr seht, auch bei uns herrscht Beständigkeit."

Mit ihrem auch geht Ursula Grattapaglia auf die Jahreshauptversammlung von Bona Espero e.V. ein, auf der die stimmberechtigten Anwesenden Margret Brandenburg als Vorsitzende, HERNIETTE OTTO als 2. Vorsitzende und Ursula Schropp als Kassierererin in ihren Ämtern bestätigt haben. Einen Wechsel gab es im Amt der Schriftführerin. Adelheid Holtmann, seit Beginn dabei und in der Gründungsphase eine große Hilfe, gab ihr Amt an ERNA SCHWEINS weiter. Kassenkontrolleure sind Willi Brandenburg und Hedwig Fischer. Als Teil des Programms VESTFALIA AUTUNO hörten sich mehr als 50 Teilnehmer die Neuigkeiten von und um BONA ESPERO an. Hannelore und Bernhard La Roche aus Kaiserslautern zeigten Diapositive aus diesem Jahr und Elfriede Kruse vervollständigte die Informationen mit einer gelungenen Auswahl Bilder von ihrem zweimaligen Aufenthalt dort.

Was wäre eine Zusammenkunft der Freunde Bona Esperos ohne Diskussion um neue Pläne "Wir wären evtl. bereit an das neue Haus einen Flügel anzubauen, eine große Halle für die technische Weiterbildung. Es müßte sich um Schnellkurse handeln, Ferienkurse, wo wir unseren jetzigen Schülern, ihren Eltern, großen Brüdern und vielleicht einem Dutzend talentierter junger Leute aus dem Dorf folgendes beizubringen: Grundkenntnisse über Werkzeuge, deren Funktion und Pflege, Wasserbau-Kenntnisse, Bau einer einfachen Toilette, Umgang mit Gasflaschen, Reparatur von Fahrrädern, Nähmaschinen, Wasserhähne, Türschlösser, Bau von einfachen Möbeln, Ställen, Häusern, Elektro-Installationen, wirtschaftliches Haushalten, kochen, backen



In kleinem Maßstab machen wir das ja schon seit Jahren, aber die Bedingungen wären viel besser, wenn wir eine Halle hätten mit Geräten und kleinen Maschinen und unsere Kinder wären besser gerüstet für ihr späteres Leben." Und Ursula schließt: "Schon jetzt gucken unsere Jungen interessiert zu, wenn Frank und Georg einen Motor, Türen, Schubladen, Tische, Schlösser oder ein Bett reparieren. Ihr seht, wir haben schon angefangen!"

Und wir machen hier Schluß! Wir beenden Esperanto's Jubiläumsjahr und das 30-jährige Bestehen von BE. Wir beginnen das 7. Jahr wirkungsvoller und darum gern geübter Solidarität. Einen herzlichen Dank an Sie alle, ganz gleich wo und auf welche Weise Sie mithelfen etwas gegen die Ungerechtigkeit in dieser Welt zu tun.

Gesundheit und Kraft für 1988

=====
Mitglieder und Förderer erhalten beiliegend die Spendenquittung für Zahlungen 1987. Bitte schreiben Sie uns, wenn etwas nicht stimmt. Sie können natürlich noch gerne bis zum Jahresende auf ein Konto von BE einzahlen und bekommen, auf Wunsch, die Quittung noch für dieses Jahr.

Verantw. Margret Brandenburg, Brinker Damm 24, D-4404 TELGTE